



Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL-TRIMONATA BULTENO

Nº45a (nova serio) - Nº¹³⁰140a - OKTOBRO 1978

REDAKTAS : Sino Pottier 21 allée des Roitelets 76190 YVETÔT.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de februaro - 10a de majo -
10a de aŭgusto - 10a de novembro.

Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ de la RUENA REGIONO.

EKSPEDAS : Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue DESSEAUX 76100 ROUEN

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE : ccp : 283.40.H.ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma Kotizo : 7,00 Fr. - SubtenKotizo ek de 40,00 Fr.

Nura abono al NORMANDA ESPERANTO BULTENO sen membreco: 7,00 Fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj."

MEMORE AL ...

Antaŭ du jaroj, mortis nia Honorprezidanto Singoro BOSC. Li estis unu el la fondintoj de U.N.E., kaj li elspezis multan energion kaj tempon por nia unuiĝo kaj por ESPERANTO ĝenerale. Tial, la estraro decidis lin honorigi okaze de la datreveno de lia morto. La esperantistoj kiuj traveturos la vilaĝon ST. VAAST D'EQUIQUEVILLE povos tie halti kaj vizitante lian tombon legos sur marmora tabuleto la surskribon:

" MEMORE AL NIA PREZIDANTO. ESPERANTO; "

Ankaŭ pri ĉiuj aliaj aktivuloj kiuj batalis por nia idealo, ni devas memori. Kompreneble, plej elstara en nia memoro devas esti la penso pri ZAMENHOF; en multaj urboj de la tuta mondo oni festas la datrevenon de lia naskiĝo, ĉi-tiun jaron ni ne povas organizi en nia regiono Zamenhoftagon; tio estas bedaŭrinda sed ni devas rekoni ke nia movado estas malforta kaj ne tre vigla. La plej bona maniero honorigi niajn mortintojn estas daŭrigi sian batalon por disvastigo de internacia lingvo. Nia movado ne prosperas; oni havas kelkfoje la impreson ke ĝi regresas. Ĉu niaj antaŭuloj laboris vane? Ĉu iliaj penoj estis neutilaj? Al tiuj demandoj, ni ricevis respondon el VARNA (Bulgario) kie okazis la internacia kongreso kun preskaŭ 5.000 partoprenintoj el 50 landoj; tiu amasa kongresego la aliaj manifestacioj ĉie en la mondo, la literaturo pli kaj pli riĉa pravas ke esperanto daŭre vivas kaj bone fartas. La evoluo de nia nia lingvo estas tutmonda. Se en nia lando kaj en nia regiono niaj klopodoj estas sensukcesaj, ni devostamen resti optimistaj.

Memore al niaj mortintoj, ni gardu la esperon.

-P. KIJO.-

- Polycopié par le Groupe ESPÉRANTISTE ROUENNAIS - DÉPÔT LÉGAL 3^e TRIMESTRE 1978 -
Le GÉRANT : P. Lemarchand.

MONKOLEKTO POR Sro BOSC.

Kiel vi legis en la artikolo de la Prezidanto, la estraro kun la konsento de Sinjorino BOSC, aĉetis memortabulon por la tombo de nia Honorprezidinto. Tiu memoraĵo malplenigis parte la kason de nia unuigo. La samideanoj kiuj bone konis Sinjoron BOSC, bonvolu elmontri sian simpatian aŭ amikecon sendante sumeton al :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE
C.C.P. ROUEN 283-40 H.

Se vi ne pagis vian kotizon, profitu la okazon sur la sama ĉeko sed precizigu tion por la kasisto. Antaŭan dankon.

Estrara Kunsido de U.N.E.

La estraro de U.N.E., kunvenis en Grand-Quevilly la 14an de Oktobro 1978 je la 14h30.

Memoraĵo pri S-ro BOSC. S-ro Quillaud informigis pri la prezo de memoraĵo deponota sur la tombon de S-ro BOSC. Tiu memoraĵo, kun la jena Teksto "Al nia Prezidinto". Esperanto, estos preta en Novembro. kaj kostos 330 Frs. Ni portos ĝin sur la tombon kun S-ino BOSC, la 9an de Decembro, je 14h30, ĉe tombejo (la pago)

Varbadseminario de U.F.E. S-ro TEXIER Informis pri seminario en Parizo la 21an de Oktobro je la 9a horo. Ŝajne neniu Normando povos ĉeesti.

BULTENO. La pasinta numero aperis malfrue pro la ferioj. Teknike ĝi estis pli bona ol la antaŭaj, sed, la grupoj pli kaj pli malofte senda raportojn

Eldonkvanto 280----Afranko 35 C.

La frontpaĝoj estas nun en limigita kvanto.

Venonta Kongreso. Ĝi povus okzi en Le Havre, kun invito de la Angloj el Southampton.

Kaso. Ĝi enhavas proksimume 2500 Frs, sed 3 bultenoj ankoraŭ ne estas pagitaj.

Zamenhofa Tago U.N.E. ne povas organizi ĝin ĉi-jare, eble la grupo en Les Andelys povos organizi ĝin kiel ĉiujare.

Venonta Kunveno. Ĝi okazos en YVETOT., ĉe S-ro POTTIER la 29a de Januaro.

BONDEZIROJ

La estrarkomitato de nia Unuigo deziras al ĉiuj ĝojajn finjarajn festajn tagojn. La nova jaro estu favora por ESPERANTO ! La kursoj havu multajn lernantojn! La lernintoj estu fidelaj! La novbakitoj estu aktivaj!

FELIĈAN NOVJARON.!!!!

NORMANIDOJ VOJAĜAS

LETERO EL BONA ESPERO (BRAZILIO)

Nia amiko Jean François , en sia Tonga letero de Aprilo , dankas nin pro la saluto kiun ni komune subskribis la 5an de Marto en Le Havre . Li daŭrigas la rakontadon pri sia longa vojaĝo sed ni devas fortranĉi multon ĉar la tuta Bulteno ne sufiĉas ! vi legu ĉi sube la parton en kiu li priskribas la Esperantistan Komunumon " Bona Espero " ...

... " Nun , mi devas paroli pri " Bona Espero " , kiu estis fondita en Alto Paraizo (Alta Paradizo en portugala lingvo) , antaŭ dudek jaroj , de Esperantista Grupo de Recife, ĉefurbo de la ŝtato Pernambuko . Fakte, kiam ili alvenis, ekzistis nenio ; ili konstruis domon , kaj poste , lernejon .

La celoj de Bona Espero estas multoblaj : unue, estas esperantista komuneco , tio estas , oni parolas esperanton , kaj oni vivas kaj laboras kune . Ĉiu Samideano , se li volas , povas vivi tie . Due , Bona Espero transprenas la edukadon de dekdu infanoj , de sep ĝis dek sep jaroj , kiuj venas de la regiono . Pro tio, Bona Espero estas rekonita de publika utileco . Trie, ekzistas en Bona Espero mem , lernejo kie lernas ses el la infanoj, kaj ses aliaj infanoj el najbaraj bienoj . En tiu lernejo, estas klasoj de la unua ĝis la kvara kurso . Poste, ili devas iri en la Kolegion, en Alto Paraizo . Kvare, Bona Espero estas kuniĝpunkto por ĉiuj Samideanoj kiuj deziras paroli esperanton kaj kunlabori . Kvine , kiel farmobieno , oni velas produkti sufiĉe da legomojn kaj fruktojn , bredi bovojn kaj bovinojn , por la propra konsumado , kaj vendi la suplementon por aĉeti kion mankas .

Nun, vivas ĉi tie S-ro Velloso , sepdekkvarjara , kiu estas unu el la fondintoj , kaj lia fratino, S-ino Nensa . Antaŭ kvin jaroj , venis de Torino (Italujo) S-ro Giuseppe Grattapaglia , kaj lia edzino S-ino Ursula , kiu estas germana , kun iliaj du filoj , nun studentoj en Brazilia . De du monatoj alvenis David, tridekjara Usonano , kiu vivis en Germanujo . Antaŭe vivis aliaj Samideanoj kiuj, post kelkaj monatoj aŭ jaroj , forlasis . La laboro en kamparo estas malfacila kiam antaŭe oni vivis en urbo, kiel estas ofte ; kaj la regiono estas tre izolita . Plie , la vivo en komuneco ne estas ĉiam senproblema , kompreneble .

De dudek jaroj , oni konstruis plurajn domojn . La unua estis la pionira domo , granda je dekdu ĉambroj , kie vivas S-ro Velloso kaj mi ; poste, estis la lernejo. Kiam Giuseppe kaj Ursula alvenis ili konstruis la blankan domon, tre granda ankaŭ (dekkvin ĉambroj) kie vivas la infanoj. Nun David kaj mi aranĝas la banojn , kaj , poste, la elektron en la dometo (tri ĉambroj) . Ĉiuj domoj havas akvon kaj elektron , kiu estas luksaĵo en tiu regiono .

Mi diris ke la regiono estas izolita . Fakte, ni estas relative proksime de Brazilia : 250 km , sed la vojo estas tre malbona . En Alto Paraizo, sur dumil kvadratkilometro-teritorio , loĝas nur tri mil homoj , kaj ni estas je dekok kilometroj de la urbo ; kelkaj bienoj troviĝas je 70 km . Do oni devas produkti sian elektron per motoro kaj havi pumpilojn por la akvo .

sekreta ...

NIA VIVO EN ...

VIRE

Malgraŭ ne tre bona sanstato (koro) mi rekomencas gvidi kurson en monato Oktobro. Miaj (tri) lernantoj vizitis kastelon de Grsillon dum tri tagoj (14-16a de Julio). Ili veturis tien kun S-ro Ma Lennan, brita samideano (U.E.A.Delegito en Exter. DEVON) kiu vizitas min ĉiujare.

Mi ĉefe zorgas pri sendado de gratulkartoj al Radio - Stacioj kun Esperantodisendoj (Berno, Lisbono; Romo; Vatikano, Varsovio.)

Bedaŭrinde, la ĉi tiea publiko ne havas intereson pri nia afero. Seneĥaj estas miaj artikolojetoj.

Tamen bofilo mia, kiu laboras en Parizo sed havas domon ĉi-tie, kaj kolegiĝo lia diligente lernas Esperanton per brjla metodo. (Ili havas tre malfortan vidpovon) Ili aliĝis al la pariza Grupo.

Vi probable scias, ke apud VIRE, precize en TESSY-SUR-VIRE (Manche) 50420 au Presbytere, loĝas blinda samideanino, F-ino FURLAN, kiu vizitis Grsijonon en lasta somero.

S-ro LEGRET.

YVEIJ

Fine de Junio 2 personoj trapasis Ateston pri Lernado. Ambaŭ sukcesis : S-ro AVRARD kun cito " Tre Bone " kaj Sino SALLIO kun cito " Bone ".

Dum la ferioj F-ino DOMINGO ĉeestis la kongreson de T.E.J.O.; en VELIKO TARNOVO kaj la Kongreson de U.E.A. en VARNA.

Ek de Oktobro okazas en la junulardomo kurso por 2 infanoj merkrede je la 10 h 30, kaj kursoj por la progresantoj marde je la 18a horo kaj ĵaŭde je la 1-a horo, por en- tute 5 personoj.

La reĝkuka festo okazos en la restoracio de la junulardomo, verŝajne la 21an de Januaro je la 14 h 30. Ĉiuj estas bonvenaj; Bonvolu anonci vin al Sino POTTIER 21 Allée des Coi- telets antaŭ la 15a de Januaro. Prezo 5 Frankoj.

FECAMP

S-ro PERMANNE faris dum la somero vojaĝon al BULGARIO, kie li vizitis sian korespondanton kaj ĉeestis la Universalan Kongreson en VARNA.

LE HAYRE

Monataj Kunvenoj : 20.05 - La abundo de informoj diversaj ne per- mesis la prezenton de parolado . Dum la distra parto , agrabla ludo estis proponata : iu tenas sin dorse al la publiko , kaj priskribas la aspekton de unu el la ĉe-estantoj ?

17.06 - Roberto Letailleux kiu , cetere , ofte vojaĝas , raportas al ni pri sia flugvojaĝo al Balearoj .

.../...

23.09 - Ankoraŭ rakonto pri vojaĝo : Silvia al ni parolis pri Grekujo , kie ŝi libertempis okaze de grupvojaĝo kun diversregionaj gefrancoj . Skizo historia pri tiu antikva lando , rakontado pri famaj monumentoj, kaj turistoj kiuj provas ŝteli ŝtonojn kiel memoraĵojn , ĝuo de la marbordo (post enirpago !) , admiro de folkloraj subĉielaj spektakloj . Lando ideala , sed kun vivkosto tre alta por la loĝantoj .

Urba Junia Festo : Inter aliaj organismoj, la Junuldomo (M.J.C.) kaj ties Esperanto-sekcio , kunlaboris en la aranĝoj . S-ro A.Chalm sukcesis aprobigi gravan buĝeton por la E-sekcio . Tio permesis alvoki la tutmondan esperantistaron ke ĝi sendu salutojn ĉi-okaze . Pli ol 450 salutoj alfluis el la tuta mondo . La Radio stacioj de Varsovio , Vieno kaj Romo anoncis la eventon . S-ro H.Tonkin , prezidanto de U.E.A. , sendis surbendan mesaĝon , kiu estis prezentita kun traduko , al la urbeŝtaro , kiu sendis returne dankan saluton . Pluraj gegrupanoj kunlaboris en la tradukado de la ricevitaj kartoĵoj kaj leteroj . Parto de la tuto estis ekspoziciata en la M.J.C. . La tuto konsistigos bazon de ekspozicio dum Oktobro .

Libro Ekspozicio : La 7an de Majo , la urbo organizis grandskalan ekspozicion de libroj por infanoj en kunlaboro kun la libro-vendistoj el Le Havre . S-ino Peltier atingis ke ni disponu lokon en la ejo . Ni povis tiel prezentigi librojn por infanoj , en Esperanto . Pluraj membroj laŭvice deĵoris en tiu multe vizitata ekspozicio , kaj ni refoje konstatis ke multaj homoj ne estas fremdaj al Esperanto

Southampton : 11 membroj de la grupo , 2 el Fecamp , kaj unu el Yvetot partoprenis en la Semajnfina Renkontiĝo organizita de nia ĝemela urbo . Temis pri kunveno de la sudaj federacioj de Britio . Ĝi disvolviĝis en la ejoj de la Universitato kun tre bona organizado . Do, interfederacia kaj internacia okazaĵo kiu, sub formo de seminario , celis instigi diskutojn pri la temo : " Kiel modernigi niajn metodojn " . Multe da bonaĵoj lernindaj el tiuj interŝanĝoj de argumentadoj , sed ankaŭ elmonstro de la lingvo-lerteco de niaj transmaraj geamikoj . Sahato vespere, balo, al kiu partoprenis la urbestro kaj edzino ; esperantlingvaj kantoj ni aŭdis de ĥoro (klasikaĵojn) kaj de artista kantistino (modernaj dum dancado) La geurbestroj afable alparolis laŭvice ĉiun ĉeestanton kaj tio atentigis ilin pri la realeco kaj vivanteco de nia lingvo ... en la vigla traduko de Amadoro Diaz .

Akcepto de eksterlandanoj : La Familio Caron prenis sur sin la zorgon gastigi Germaninon F-ino Birgit Bigge dum du semajnoj en la feria periodo, responde al alvoko de Esperanto Centro Paderborn .

Gloso : Atentu ! ni erare indikis ke la vorto " Sotano " estas mallongigo de la vorto " Southampton-ano " (Bulteno 121a paĝo 3a) Konsente kun niaj amikoj de la ĝemela urbo , bonvolu noti ke nun estos uzata : Southampton = Sotono kaj Southampton-ano = Sotonano .

Ĝenerala Kunveno : Ĝi okazos la 21an de Oktobro ĉe François 1er . Venu multnombraj . Jam la elekto-kampanjo komenciĝis !

Komitato de H.E.G.

KOTIZ-TABELO DE UFE POR 1978/79

Lernanto de lerneja kurso (al)	6
« Ami de l'Esperanto » (b) min.	20
Simpla membro (a)	20
Membro abonanto (c)	
- 22 jaroj (2)	55
- 26 jaroj (2)	60
+ 26 jaroj	60
Membro subtenanto (c)	120
Membro benefikanto (c)	200
Dumviva membro abonanto	1.600
Dumviva membro subtenanto	2.400
Dumviva membro benefikanto	4.000

KOTIZ-TABELO de UEA POR 1979

M.J.K. kun jarlibro k. Kontakto (gis inkl. 25 j.) (2) ..	44,00
M.J. kun jarlibro (+ 25 j.) ..	44,00
MA.K. kun jarlibro, Esperanto kaj Kontakto (gis inkl. 25 j.) (2) ..	110,00
M.A. jarlibro kaj Esperanto (+ 25 j.) ..	110,00
S.Z. aldonu por la Societo Zamenhof ..	220,00
D.M. dumviva membro ..	2.750,00
S.A. abono al ESPERANTO ..	66,00

(1) Tiu kotizo, starigita eksperimente en rilato kun la laborplano de ILEI, validas kondiĉe ke la kurso aŭ la grupo aliĝu kiel membro-abonanto.

(2) Ĉiam indiki precizan naskiĝdaton.

(a) Ricevas membro-karton, E-Actualités.

(b) Ricevas membro-karton kun franca teksto kaj E-Actualités.

(c) Tiuj kategorioj, same kiel la dumvivaj membroj, ricevas membro-karton, E-Actualités kaj RFE.

COMMENT ADHIERER ?

Les cotisations (sympathisants : 20 F, membres abonnés : 80 F) sont à envoyer au compte de votre fédération régionale.

NORMANDIE

c/cp: Fed. Normande des Centres Cult. Esperanto 2348 06 Z ROUEN.

KOTIZO FRUE PAGITA
ESTAS DUFONE DONITA

Al tiuj kotizoj, oni aldonu la specialan kotizon por federaciaj buketoj, aliĝoj al grupoj...

ALIAJ ORGANIZOJ

S.A.T. 67 Avenue Gambetta
75020 - PARIS.

C.C.P. Paris I234-22

Aliĝo kun "Sennaciulo" 75 Frs.
Abono al "Sennacia Revuo" 15 Fr

S.A.T. Amikaro (sama adreso)

Aliĝo + abono: 60 Frs.
(+ 3 frs por aliĝo de novaj membroj)

F.K.U.E. Kotizo + abono al Franca Katolika Esperantisto 12 Frs.

Association Catholique Française pour l'Esperanto

C.C.P. ROUEN 2324 - 93 N.

Abonoj. Heroldo: 62 Frs

(pere de U.F.E. - C.C.P. 855 - 35 . PARIS

E l Popola Cinio . 14 F por 1 jaro

21 F por 2 jaroj

28 F por 3 jaroj (pere de U.F.E.)

Le Travailleur Esperantiste 20 F (pere de S.A.T. Amikaro)

ne forgesu vian jaran kotizon al U.N.E.

7,00 fr. minimume. Dankon! _____

c.c.p. : Rouen 283 40 H _____

CHRONIQUE ESPÉRANTISTE

Le 63ème Congrès Universel d'Espéranto s'est tenu à Varna (Bulgarie) du 29 juillet au 5 août. Il a réuni plus de 4500 personnes, venues de 51 pays du monde. (Pour la première fois une délégation chinoise était présente). C'est un des plus importants Congrès Universels ayant jamais eu lieu. Le Directeur de l'U.N.E.S.C.O., M. A.M. M'Bow, a envoyé au Congrès un message de sympathie. Le Congrès a comporté de nombreuses séances de travail et des distractions de toutes sortes (excursions, bal, théâtre, chants, concours littéraires). Le théâtre de marionnettes de Varna a joué plusieurs fois « la Belle au Bois Dormant ».

Un Congrès d'aveugles et un petit congrès d'enfants (de 6 à 13 ans) ont également eu lieu.

Un service a rassemblé plus de 1000 personnes dans la cathédrale de Varna.

Le Congrès Universel avait été précédé du 22 au 29 juillet par un Congrès des jeunes Espérantistes qui s'est tenu à Veliko Tarnovo, pittoresque ville bulgare.

Le 30ème Congrès Universel des Cheminots Espérantistes s'est tenu à Rome du 13 au 20 mai. Il a rassemblé 350 cheminots venus de 18 pays du monde (même du Japon). Au nombre des participants, figurait le sénateur A. Del Nero, président du groupe parlementaire « les Amis de l'Espéranto ». (Un groupe semblable existe au Parlement Britannique), et de hautes personnalités des Chemins de Fer Italiens.

Des cours universitaires donnés uniquement en espéranto ont eu lieu à l'Université de Liège (Belgique) du 6 au 27 août. Les sujets traités étaient la psychologie, l'athlétisme, et la littérature mondiale. Des cours semblables ont déjà eu lieu les années précédentes dans la même université.

L'espéranto a une Académie qui veille au maintien de la pureté de la langue. Sur le plan national, l'Institut Français d'Espéranto joue le même rôle et par ailleurs organise les divers examens depuis celui qui consacre l'étude élémentaire de la langue jusqu'au plus élevé, équivalent d'une licence.

Entre le 14 et le 18 mai a eu lieu à Tokio la 69ème réunion annuelle du mouvement Rotary International. Des brochures d'information sur l'espéranto y ont été distribuées. Les rotariens espérantistes japonais y ont organisé une réunion d'accueil pour leurs collègues des autres pays.

Des manuels d'espéranto se trouvent à la bibliothèque municipale de Vire.

Pour tous renseignements sur la langue s'adresser à M. Legret A., 14 rue des Sablonnières Vire ou à l'Union Française pour l'Espéranto 4 bis rue de la Censière Paris 10ème.

LA VOIX DU BOCAGE - 26-9-1978

NORMANDA RECEPTO
por pligrandigi la Membraron
(Dua strofaro)
(vidu Bultenon de Junio 75)

Multaj larmoj en ve-ado
Sed aliaj en Movado
Zorgoj pri propagand', kursoj,
Ĝembarsoj ...

Ĉiam ili, por ekzemplo,
Per agado, ne kontemplo,
Al ni montradas la vojon,
Plian fojon :

Denove la Rueva par'
Laboris je la Sankta Far'
Brave ! demetigu ĉapel'
... Jen Lionel !

Nu, dormemuloj hontu !
Torĉon pioniran prenu !
Kreigu nova, kun raci',
... Generaci' !

Gojano

FELICIAN

1979
NORMANDIA

PRESTIĜO DE VERSAJLO-KASTELO.

an Versajlo tia kia oni neniam rakontis al ni !

UNUA PARTO. La ORA FLANKO.!

Lan la volo de LUDOVIKO XIVa, nomata SUNREGO, ia vilaĝeto apuda al Parizo, (ĉirkaŭ 20 kilometroj) travivis eksterordinaran epokon, ĉar estis por ĝi la loko de simbolo de glortagoj, beleco kaj potenco de Francio je sia apogeo.

Kiam la Sinjorino SEVIGNÉ vizitis la palacon novkonstruitande la famkonata arkitekto MANSART, ĝi tuj ekkriis " Estas la plej bela kastelo en la mondo "; vortoj historiaj ĉar Versajlo kun la Vatikano estas nune la plej imponaj monumentoj vizitindaj de la turistoj tra Eŭropo. Ĉiujare, preskaŭ 3 milionoj da vizitantoj el kiuj 75% da eksterlandanoj promenadas tra salonoj kaj ĝardenoj

Komence staris malgranda konstruaĵo nur por ĉasistoj konstruita lan la deziro de Ludoviko XIIIa. La ĉirkaŭaĵo plaĉis tiale al li ke sep jarojn pli malfrue li petis la arkitekton Philibert LE ROY transformi ĝin en malgrandetan kastelon el ŝtonoj kaj brikoj. Oni konstruis nur centran masonaĵon posedantandu alojn kaj kvar angulajn pavilonojn.

Pro la bleco de pejzaĝo naskis ĉe la SUNREGO deziro vidi ĝin ĉiutage. Do, antaŭ ol efektivigi la kastelon nuntempe konatan en 1661, li ordonis pligrandigi la nobeldomon de lia patro kaj komencis krei ĝardenojn pri kiuj li ĉiam estis aĝe fiera.

Komence de la jaro 1663, LE NOÛRE desegnas florbedojn LE VAU starigas la unuan oranĝerion- LE BRUN zorgas pri dekoracio. Dum 1670; pavilono estas konstruata ĉe Trianon. Pli malfrue, en 1678, MANSART ĵus finis projekton de estonteca kastelo. Lan tiu projekto, oni devus aldoni, al la centra parto de la nobeldomo antaŭe konstruita, du imponajn alojn kaj sur la teraso oni konstruus la vastan spegulgalerion. Post la aprobo de la Reĝo, la laboro rapide antaŭas kaj la sekvontaj jaroj jam la suda alo estas finita. Tuj Ludoviko XIVa enloĝiĝas por pli facile kontroli la laboraĵojn farotajn.

Dum 1684, la galerio de speguloj kaj la granda salono estis finitaj. 1688 vidis la finaĵon de la " Granda Trianon " En 1710 oni inaŭguris la Reĝan Kapelon kaj oni ankaŭ aplaudis pri la fino de la laborego kiu daŭris 50 jarojn kaj videble malriĉigis la popolon.

Tuj poste la vilaĝo dikiĝis rapide ĉar - la princoj la nobeloj, korteganoj, soldatoj, lakeoj, komercistoj - dense amasiĝas: ĉu en la palaco, ĉu en hoteloj kiujn, iom post iom, oni starigis apude. Entute, je la epoko, nombris 10 mil personoj en Versajlo.

Sed, por havi privilegion vivi apud la Monarĥo ĉiuj devas rezigni pri komforto. Malgraŭ la riĉa fasado de la kastelo, la kortego reĝa frostetremas vintre. Efektive, per ekranoj kaj pied-hejtilettoj oni devas sin protekti kontraŭ la frosto kaj vent fluoj. La aero estas tiel malvarmega ke akvo kaj eĉ la saŭcoj frostas sur la manĝotablo de la reĝo.!!

Sed, Move, kion diri pri higieno.!!!!

Matene, kiam Ludoviko solenece marŝas en la spekulgalerio por saluti la kortegon, li ne lavas sin, kvankam li posedas banojn, la solan en la kastelo. Aliparte ne ekzistas neceso. Ĉiu uzas ĉu koridorojn, ĉu subŝtuparon, ĉu angulon... K.T.P. Oni povas imagi ke la aero estas riĉa je suspektindaj odoroj, despli ke estas tiuj de bovinaj, kaprinaj kaj azeninaj, kiuj povas eniri ĝis eĉ en la ĉambroj de la geprincoj, ĉar, en la epoko, la lakto estas uzata kiel kuracilo.

Post la morto de la SUNREGO, lia filo, LUDOVIKO XVa deziris pli da komforto. Tiam li klopodis por ordigi la kastelon.

Nuntempe, en la jaro 1953, iu alvokis por savi la kastelon kiu suferis multe da difektoj. Pluvas en spekulgalerio. La lignaĵoj putras, la muroj fendetiĝas, la pentraĵoj malboniĝas, K.T.P... Neniam reparoj fariĝis de post la regado de la reĝo LOUIS PHILIPPE. Nur Sro ROCKFELLER donacis, en 1925, 75.000 dolarojn por restarigi la tegmenton de la spekulgalerio kaj la domon de MARIE - ANTOINETTE kun la statuoj de la parko.

Impona laboraĵo en tiu palaco kiu posedas 700 ĉambrojn, 2153 fenestrojn, 67 ŝtuparojn, 352 kamenojn. Sed la kuratoro de tiu monumento vasta, senĉese agis ĝis kiam oni planis por realigi savadon de la Versajlkastelo.

I miliardon da frankoj balotis la registaro.... sed ne sufiĉas! Tamen estis devigite krei laborejojn por la restarigo. Multaj metioj reviviĝis. Metiistoj tiel kiel la silklaboristoj reuzis teksmaŝinojn funkciantajn per mano por teksti la ruĝan kaj oran brokaton de la reĝa ĉambro.


Ĉe la kolektantoj oni retrovis meblojn kaj objektojn epokajn. Tiele estis riparitaj, de metiisto pasigata, 70 horloĝoj rimarkindaj ĉar ili estas la solaj kiuj funkcias regule en muzeo tra Eŭropo.

Tial post 20 jaroj da pacienco Versajlo kastelo retrovis parton de sia brilego de estinteco, sed restas multe por fari.

S-ro GUERRE



daŭrigata



ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon F-49150 Baugé

Poŝtkonto : Nantes 1485 39 P

Telefono:

dum la aranĝoj (41) 89 10 34

ekster la aranĝoj (40) 76 77 95

KULTURAJ ARANĜOJ

+++++

1979

+++++

PRINTEMPO :

alveno Merkredon 11an de Aprilo posttagmeze

foriro Merkredon 18an de Aprilo matene

- Renkonto de infanoj
- Praktika pedagogio

SOMERO :

P R E L E G O J

de Lundo 2a de Julio ĝis Sabato 21a de Julio

- Triteremaj prelegoj
- Diskutoj
- Praktiko kaj studo de la lingvo
- Teatra laboro
- Ekskursoj

K U R S O J

de Lundo 23a de Julio ĝis Sabato 11a de Aŭgusto

- Rektmetoda kurso por komencantoj
- Grupa praktikado
- Studado de la lingvo (tradukado, studado de verkaĵo, teatro...)
- Manlaboroj
- Ekskursoj

A R T L A B O R O J

de Lundo 13a de Aŭgusto ĝis Sabato 1a de Septembro

- Fotoarto (fotado, rivelado, prezento de fotoj,...)
- Folkloraj dancoj
- Studado kaj praktiko de la lingvo
- Ekskursoj

N.B. : -- Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj, kvankam la celo de la kursoj ne estas la preparado de tiuj ekzamenoj. .

- La aliĝintoj, kiuj ne deziras restadi dum tuta periodo devos tamen alveni iun lundon kaj foriri iun sabaton.